# La Ora Rajdanto

ESPERANTO-KLUBO SCHWERIN N-RO 148 (3/25)

**Informilo el la landa ĉefurbo de Meklenburgio-Antaŭpomerio**


## Somera festo sur la teraso en Neumühle

*Tradicie la klubanoj en Ŝverino antaŭ la somera paŭzo uzis la lastan kluban vesperon kiel somera festo. Jam ekde GDR-a epoko oni renkontiĝis en la ĝardeno de la familio Kurtz. Inter 2006 ĝis 2010 alterne ofertis familio Kurtz aŭ Walli Baumann siajn ĝardenojn. Pro la konstruo de la kvartalo "Waisengärten" (orfaj ĝardenoj) la familio Kurtz perdis sian ĝardenon.*

*Ĝis 2017 la klubanoj renkontiĝis nun en la ĝardeno de Walli Baumann kaj poste ĝis 2024 apud la boatremizo de la familio Kurtz pro la somera festo. Ankaŭ la boatremizo intertempe estas vendita. Pro tio ĉi-jare Gabi kaj Ralf invitis al terasa festo en la kvartalo Neumühle (Nova muelo). Kiel kutime ni kradrostis kaj multe babilis eĉ apud sunlokoj de la garaĝo. Por la du infanoj estis sufiĉa spaco por ludi pilkobalon.*



**www.esperanto-sn.de**

# EL LA KLUBA VIVO

**Superrigardo de la 120-jara historio de Esperanto en Ŝverino**

***1905***
*Marie Hankel kaj Gotthilf Sellin eklernis Esperanton en Ŝverino*




***1924***
*La 16-jara Wilhelm Wieschendorf fondis unuan E-grupon de la laboristoj*

***1930***
*Tri E-kursoj de la engla instruisto Isaac Flower finis en Ŝverino*

***1946***
*Fondiĝis „Lunda Klubo“ por la regiono de la nuntempa Meklenburgio-Antaŭpomerio ĝis la malpermeso en 1949*

***1966***
*Fondo de la subdistrikta laborrondo en la Germana Kulturligo sub la nomo Espernto-Klubo Ŝverino*

***1985***
*La 5-a Internacia Medicinista Esperanto Konferenco (IMEK) kun pli ol 80 gastoj*

***1988***
*La informilo „La Ora Rajdanto“ aperis*

***1992***
*Unua tutgermana Esperanto-Kongreso (70-a GEK), plantado de E-tilio kaj inaŭguro de memorŝtono*

***1995***
*Solena aranĝo „90 jaroj de Esperanto en Ŝverino“*

***2005***
*Solena aranĝo „100 jaroj de Esperanto en Ŝverino*

***2007***
*Marie-Hankel-Strato en kvartalo nomita laŭ meritaj virinoj*

***2010***
*Landa renkontiĝo „Historio kaj poezio“*




***2015***
*Solena aranĝo „110 jaroj de Esperanto en Ŝverino*

***2024***
*Televida raporto pri la klubo en la elsendo NDR Nordmagazin*

***2025***
*Solena aranĝo „120 jaroj de Esperanto en Ŝverino*

# EL LA KLUBA VIVO

## Vilhelmo el Santiago de Kubo vizitis nian urbon kaj la klubon

*De 31.08. ĝis 04.09.2025 André gastigis per Pasporta Servo kuban gaston. La 47-jara Guillero Bes Salasar, agronomo el Santiago de Kubo, kun Esperanto-nomo Vilhelmo, travivis miksitan programon de André. Ili komune vizitis la havenurbon Wismar (Vismar), bienon apud vilaĝo kaj la regionon apud la lago Schaalsee (Ŝalze).*




*Dum mardo posttagmeze Ralf ĉiĉeronis la gaston tra la urba centro ĝis la kastelo. Poste ili en la hejmo de Ralf kafoklaĉis, ripozis kaj eĉ ĝuis fulmotondron kaj ĉielarkon. Vespere Vilhelmo renkontiĝis kun la klubanoj en la restoracio PIER 7.*



*Dum la interparoladoj li esprimis, ke la kuba popolo tre suferas nuntempe eĉ pro malsato kaj mankanta elektroenergio. La klubanoj deziras multan feliĉon dum la pluaj vojaĝoj.* *– roko -*

*La renkontejo estas Klöresgang 1 (apuda enirejo, unua etaĝo) en la buroo de la vojaĝoficejo „ReiseService Schwerin“, kie ni kutime renkontiĝas ĉiun unuan lundon monate je la 17-a horo.*

Esperanto- Klub Schwerin

***2025***

| | |
|---|---|
| *06.10.* | *Raporto pri la UK en Brno - André* |
| *17.11.* | *rezultoj de la solena aranĝo “120 jaroj E en Ŝverino” - ĉiuj* |
| *16.12.* | *Zamenhofa Vespero en ĉina restoracio Pekina Anaso je la 18a horo* |

*Dum ĉiu kluba vespero eblas konsultaĵoj laŭ antaŭa demando por interesitaj gelernantoj!*



# LAMA INFORMAS

## André Weber partoprenis al UK en Brno 2025

*Laŭ oficiala statistiko de la UK aliĝis 1132 esperanntistoj el 63 landoj, sed ĉeestis 947 kongresanoj el 52 landoj. Plejmulto de la kongresanoj estis de Ĉeĥio, la gastiglando de tiu ĉi UK. Poste sekvas kongresanoj de Germanio, Pollando kaj Francio. La aĝo de alvenintoj variis de 1 ĝis 98 jaroj.Ĉi-jare partoprenis 135 TEJO-aĝaj kongresanoj!*




*Komune kun japana esperantisto André vojaĝis al la ĉijara Universala Kongreso en ĉeĥa urbo Brno dum julio. Li raportis, ke kelkfoje estis tiel samtempaj aranĝoj, ke oni malfacile povis elekti la tre interesan prelegon. Ankaŭ Birke, Bertilo kaj filino Gitta ĉeestis. Sed neniu rimarkis la kuban gaston Vilhelmo, kiu poste vizitis nin. André dum oktobra kluba vespero raportos pli multe pri la kongreso. – roko -*

## 56-a Landa Renkontiĝo de LAMA en Güstrow

*La ĉi-jara Landa Renkontiĝo okazis la 15-an de majo 2025 en la „Frühstücks-Café Schörx“ en Güstrow. Partoprenis naŭ geesperantistoj el Ŝverino, Neŭ-brandenburg kaj Prenzlaŭ.*



*Apud la oficiala interkonsiliĝo la partoprenantoj kantis bonkonatajn ŝlagrojn kun Esperanto-tekstoj.*

## 111-a UK en Graz – Aŭstrio 2026

111-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
GRAZ
1.–8.8.2026

**redaktoro:** Ralf Kuse, **retpoŝto**: rok.ovo@mail.de **aperas:** kvaronjare
**La Esperanto-Klubo Ŝverino estas loka grupo de la Germana Esperanto-Asocio**